

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48

ivnicolas@sfr.fr

Abon-kotizo : 8 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasisto : Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers



UTILISEZ L'ESPERANTO !

Regardez cette jolie photo. Avant de se perdre à l'horizon, le regard plonge sur une place ensoleillée. Nous l'avons choisie pour fêter le printemps et l'espoir.



Et puis, elle a une histoire, cette photo. Nous l'avons trouvée dans les archives de Clément Martin, confiées récemment par son fils. Clément Martin (1913-1995) a enseigné trente années durant l'espéranto à Lisieux et entretenu une longue correspondance avec un espérantiste tchèque, Francišek Kubica. Ce

dernier était médecin à Jihlava, en Moravie du Sud. Photographe amateur, mais reconnu dans sa région et plusieurs fois primé dans des salons, le Docteur Kubica ne manquait jamais de joindre à chacun de ses courriers un ou plusieurs de ses clichés.

C'était un beau cadeau, et des cadeaux de ce genre l'espéranto nous en fait souvent pour peu que nous l'utilisons. **Lisez, voyagez, correspondez, adhérez à des associations nationales ou internationales. Utilisez l'espéranto.**

Ecrivez en espéranto ! Vous contribuerez ainsi à son développement et aussi- peut-être, surtout- vous en tirerez de grandes satisfactions. Remercions Sylvie Caron, Marcel Lemeltier, Christian Levesque, Henri Rousseau, Gérard Lecarpentier pour l'envoi d'articles au contenu très varié. Quelle joie pour le (nouveau) rédacteur d'avoir des textes intéressants à mettre en page et de pouvoir même en garder un peu pour le prochain **numéro !**

Vos prochains articles et vos informations sur l'activité de votre groupe doivent nous parvenir avant le Premier Mai.

" Ah ! Voici le nouveau bulletin normand ! Voyons-voyons, ai-je réglé mon abonnement-adhésion 2015 ? "

Pierre Lemarchand ne rédige plus le bulletin qu'il a livré pour la dernière fois avec le numéro de novembre 2014. Son savoir-faire nous manque déjà et sans doute pour longtemps. 2015 est donc un nouveau défi pour notre association que le Conseil d'Administration, issu de notre assemblée générale de septembre 2014, est chargé de relever. Une première réunion de passation des consignes et des documents associatifs s'est tenue à Hérouville le 11 novembre en présence d'Anne-Marie Leprévost (Flers), de Pierre Lemarchand (Hautot-sur-Seine), Jean Colombel (Montivilliers, groupe du Havre), Gérard Sénécals et Yves Nicolas, tous les deux d'Hérouville. Nous nous sommes également redistribué les rôles. Yves, maintenu président faute de nouveau candidat, a pris la rédaction du bulletin. Jean est devenu trésorier avec comme première mission de s'informer sur le transfert de compte. Anne-Marie a pris le poste de secrétaire.

Barthélémy Maurau (Evreux), contacté depuis, est devenu le trésorier-adjoint.

Ces changements administratifs ont été déclarés à la Préfecture de Seine-Maritime, l'association élisant désormais domicile à l'adresse de Jean Colombel.

La deuxième réunion du Conseil d'Administration s'est tenue le 14 février dernier à Montivilliers, près du Havre où Jean Colombel nous a gentiment accueillis. Etaient présents les membres du bureau (à l'exception de Barthélémy Maurau) ainsi que Sylvie Caron, Christian Lévesque, et Gérard Sénécals, membres du Conseil d'Administration et représentants des groupes du Havre, du Sud-Manche et d'Hérouville. En résumé, voici le contenu de nos échanges et de nos décisions.

Quelques décisions. Pour économiser les frais postaux, et alléger la tâche du rédacteur qui gère également les tournées de conférenciers pour Espéranto France, notre bulletin ne paraîtra plus que trois fois dans l'année.

Les prochains numéros pour 2015 vous parviendront donc en mai et en octobre. Puis en 2016, en janvier, en mai et en octobre.

Au programme de nos activités : L'assemblée générale devrait avoir lieu le samedi 20 juin. Nous y accueillerons, comme les années passées, un conférencier étranger.

Le groupe du Havre organisera une promenade dans les rues de sa ville en octobre.

Nous espérons organiser également des réunions publiques dans différents clubs de notre région à l'occasion de la venue de conférenciers étrangers.

Le détail de ces rendez-vous vous sera indiqué dans notre bulletin du mois de mai.

A noter dans votre agenda.
Assemblée Générale de
Espéranto Normandie, le samedi
20 juin à l'Abbaye de Bricquebec
avec un conférencier chinois

Diffusion du bulletin

Certains de nos abonnés ont émis le souhait de recevoir le " Normanda Bulteno" sous la seule forme électronique.

Merci d' informer Yves Nicolas à ivnicolas@sfr.fr

NOM.....Prénom.....

Adresse.....

Adresse électronique.....@.....

désire recevoir le bulletin uniquement par @ ☐

par courrier et par @ ☐

Kio nova en niaj kluboj ?

Flers : 5 progesantoj marde partoprenas la kurson de Anne-Marie. Kelkaj staĝis en Pluezec. Miŝa sukcese trapasis ununivelan ekzamenon. Dua kurso okazas ĉiun duan vendredon.

Hérouville : Tri homoj sekvas la unugradan kurson kiun gvidas Gigi Sénécal. Inter 12 kaj 20 homoj frekventas la konversacian rendevuon kiu okazas ĉiun mardon en Maison des Associations. La rendevuo estas gvidata de diversaj homoj laŭ trimonata programo.

Kio nova en la agla nesto ?

L Aigle estas ĉarma urbeto atingebla per vojoj arbaraj kaj montetaj, en « Pays d'Ouche ». Ni tie rendevuis, la 17an de januaro, kun Pascal Hébert por informtago pri esperanto en solidara kaj asocia kafejo CAFISOL. Ne imagu ŝikan kafejon kun komfortaj divanoj kaj grandaj montrofenestroj. La kafoĉambro, en malnova domo de strato Saint Jean, estas modesta kun ordinaraĵoj. Certe, diveneblas, ke la loko ne havas kiel ĉefan celon komercprofiton. Tuj kaptas la atenton teraj skulptaĵoj de Fanny Ferré, artisto de proksima St Sulpice. Ili surscenigas tristajn hometojn en ĉiu-tagita vivo. Iuj sidas ĉe tablo kaj kvazaŭ rigardas nin. Alie, knabo de ŝtuparo atente observas kuirantan virinon. Ĉiuj aspektas malriĉe kaj la muroj, kiujn apenaŭ skulptis la artisto por ke ni eniru la ĉambrojn, povus esti tiuj de frakasitaj aŭ krevitaj domoj. El tiuj skulptaĵoj ŝvebas stranga kaj maltrankviliga etoso sed kiun kreis senkonteste altranga artisto. Ŝia mesaĝo enhavas trafen signifon en tia loko.



CAFISOL kiun vigligas Franck Ginisty kaj Aleksandra Mantopoulos volas esti rendevuo de artistoj, de senlaboruloj, de loĝantoj el diversaj devenoj sed kun deziro renkonti siajn najbarojn por rompi solecon aŭ/kaj por konstrui homaman societon kadre de loka disvolviĝo ekonomia kaj demokrata.

Oni tien venas por starigi lokajn projektojn, por kune trinki aŭ tagmanĝi, por uzi Linusajn komputilojn, por amuziĝi per tabloludoj kaj baldaŭ, kial ne ?, por lerni kaj ĝui esperanton.



Zef, Jean-Pierre, Pascal, Anne-Marie

Tion volus organizi Pascal Hébert kiu lernis esperanton antaŭ dekkvin jaroj (10 perretaj lecionoj kaj poste 28 lecionoj per koresponda kurso kun Daniel Luez). Li nun aktualigas sian lingvonivelon kadre de kurso ĉe la sidejo de SAT-Amikaro, en Parizo kie li laboras.

Alportis ekspozician materialon Anne-Marie kaj Zef (Flers), Jean-Pierre kaj Yves (Hérouville). Malmultaj vizitantoj venis sed ni pasigis tre agrablan tagon kun entuziasma kantado de Anne-Marie kaj Pascal, ankaŭ kun interesaj kaj fervoraj klarigoj pri sia agado de Aleksandra kaj Franck. Intervjuis loka ĵurnalistino kaj ni povas esperi, ke dank'al lia raporto kaj konstanta reklamo pri esperanto baldaŭ okazos kurso en L'Aigle kaj publikaj kunvenoj kun eksterlandaj prelegantoj.

La verdaj agloj fiere flugu super la tegmentoj de L'Aigle !

Kio nova en niaj kluboj ?

Le Havre : Proksimume 15 anoj ĉiu-monate, la trian sabaton, kunvenas por babili. Sylvie ofte uzas la ludilon « Rory's Story Cubes » por paroligi la ĉeestantojn. Ĝi konsistas el 9 kubo kaj 54 bildoj por konstrui amuzajn rakontojn.

Manche : Kadre de la Inter-Aĝa Universitato, Christian gvidas du kursojn. La unua por 2 komencantoj kaj la dua por 4 progresantoj. Tri jam staĝis en Pluezek. Ili okazas ĉiu-semajne en Granville. Ankaŭ okazas babilrondo en Coutances kiun partoprenas 6 homoj. Philippe Bony, en Collège-Lycée Jean-Paul II de Coutances, gvidis kurson dum ses monatoj por 4 lernantoj.



Caen : André Dubois daŭre gvidas monatan kunvenon nome de AFCE¹. Li lernis esperanton kun S-ro Angenault² ĝis 1995. Post nelonge, li mem gvidis la fervojistan kurson. Dum preskaŭ dudek jaroj, 20 homoj frekventis tiun kurson. André, eks-maroficiro kiu konkludis sian karieron kiel plurregiona direktoro de SOGEA, nun 84 jaraĝa sed energiplena, firme staras sur la ferdeko ! En fervojista salono, apud la stacidomo, kvar homoj frekventas plu lian ĉiu-monatan kunvenon kiu konsistas el babilrondo kaj tradukoj.

LEGINDAJ RETPAĜOJ kaj LIBROJ

Nia amiko Alain Chalm el la grupo de Le Havre (76), altiris nian atenton pri la fakto ke Ĉinio dissendas per interreto multajn kaj tre diversajn altnivelajn konferencojn en esperanto. Por atingi tiujn programojn sufiĉas taji ĉe la fenestro Google : "**Universitato Esperanto**". Ek de la una responda linio, oni vin proponas ĝeneralan prezenton de la traktitaj temoj. Interalie, estas proponitaj 33 lecionoj, iom malpli ol unuhora ĉiu, pri astrofiziko kaj astronomio, kun bildoj. Ili estas prezentitaj de izraela esperantista astrofizikisto, kies prononcado estas perfekta. Almenaŭ du normandaj samideanoj sekvis parte tiujn lecionojn kaj juĝis iĝin ege interesajn. Provu ! H. R.

HOMOJ DE PUTIN, la silenta plimulto de Rusio, Kalle Kniivilä. Eld. Flandra Esperanto-Ligo. 2014. Kalle Kniivilä estas ĵurnalisto, esperantisto kaj ruslingvano, specialisto de la rusa socio. Li vojaĝis en Rusio por renkonti subtenantojn de Putin, kies voĉoj malofte aŭdiĝas en eksterlandaj amaskomunikiloj. Tamen ĝuste ili decidis pri la estonteco de Rusio. Tre legindaj intervjuoj por kompreni la sintenon de la rusaj civitanoj kaj de Putin mem. La libro, kiu aperis ankaŭ en la rusa kaj la finna, ricevis premion de la plej bona nefikcia verko en Finnlando ĉi-jare fare de la prestiĝa kultura revuo « Kanava » (kanalo).

Les langues artificielles sont-elles des langues ? Etude contrastive de l'espéranto et de la caractéristique universelle. Sarah Marlaud. Revuo : « Syntaxe et Sémantique 14 ». Eld. Presses universitaires de Caen. 2013. Tiu revuo estas redaktita de CRISCO, « Centre de recherches inter-langues sur la signification en contexte ». En si mem tiu titolo sugestas fakajn kaj kompleksajn vortotrezoron kaj traserĉon ! Tamen la artikolo de Sarah Marlaud alportas al atentema leganto interesajn informojn pri la ofta kaj ŝablona demando «Ĉu esperanto estas lingvo ? ». Por (jese) respondi, ŝi submetas la internacian lingvon al 14 punktoj kiuj karakterizas la « naturajn » lingvojn.

Konvinka kamuflaĵo. Trevor Steele. Eld. Flandra Esperanto-Ligo. 2013. Trevor Steele regule aperigas romanojn kaj estas konata kiel lerta kaj vigla verkisto kiu pritraktas interesajn kaj tre diversajn temojn. « Konvinka Kamuflaĵo » konfirmas liajn talentojn. En amuzaj, informriĉaj, kelkfoje tristaj kaj mirindaj paĝoj, li kaptas nian atenton pri sia bunta, aventurplena kaj multaspekta vivo. Y. N.

¹ Association Française des Cheminots pour l'Espéranto

² Afabla kaj disponebla instruanto, Gilbert Angenault gvidis kurson en Caen ekde la fino de la sepdekaj jaroj. Li forpasis en majo 1999. Sen manke ni iam priskribos lian agadon

PRELEGO PRI LANTI DUM KONGRESO DE SAT EN DINAN

Estas ĉiam ĝojiga momento partopreni, eĉ se por nur kelkaj horoj, Esperantan Kongreson. Se plie ĝi okazas en urbo riĉa je historiaj monumentoj kaj florornamitaj domoj dum bela somera tago, vi rehejmeniras kun la sento de neforgesablaj travivaĵoj.

Laŭ la propono de Vinko Markovo, ni kune podiumis pri la Kamarado Lanti, kiun la Grupo de Hérouville bone konas post la agrabla vespero, kiun oni dediĉis al li. Sed, ĉi-foje ni povis desegni pli fidelan portreton de la fondinto de Sennaciismo dank'al malkovro de dokumentoj ĝis nun preskaŭ ne uzitaj. Temas pri " militaj notlibretoj", kiujn verkis Lanti dum la unua mondmilito kiam li soldatis kiel brankardisto.

Kial tiu ĉi malfrua malkovro? Okazis, ke E. Borsboom, la aŭtoro de la referencfaranta biografio de Lanti (1976), resendis al SAT lastjare la tutan materialon uzitan tiucele kaj inter alie la militajn notlibrojn.

La hazardo volis, ke nia podiumado okazu la 12-an de aŭgusto, je la ekzakta dato kiam Lanti ekis sian unuan notlibron. Je miaj okuloj, tiuj kvar libretoj estas vera trezoro por tiu, kiu interesiĝas pri la personeco de Lanti.



Tiuj notlibretoj kun griza kovrilo, france redaktitaj, atestas malpli pri la kruelaĵoj de la milito, ol pri la homo antaŭ eventoj kiuj vole nevole senvualigas la koron

de ĉiu partoprenanto. La sorto volis, ke nia Kamarado troviĝis kun katolikaj pastroj, precipe normandaj kaj bretonaj. Oni povus imagi Lanti plena je malbenoj kontraŭ tiuj reprezentantoj de trudema povo. Ne tiel estas. Li bedaŭras iliajn mankojn rilate al la sociaj problemoj, la kliniĝoj de iuj al alkoholo, se ne paroli iliaj militismo. Sed, li admiras ilin kiam ili modeste plenumas sian taskon kaj estas fratoj por siaj kunuloj. Leginte tiujn paĝojn, oni povas rektigi asertojn, kiujn mi renkontis ie kaj ie pri Lanti. Unu el ili estis, ke li ne majstris la francan. Male Lanti sufiĉe ofte priskribas pejzaĵojn per lertaj kaj abundaj precizoj : " Où allons-nous ? Le train file au milieu d'une superbe plaine voilée par le brouillard. Un matin paisible et

calme. La nature semble d'une douceur infinie...et des hommes vont s'entretuer...Dans l'immense plaine, des moissons abondantes attendent les moissonneurs. Hélas ! Ils sont partis là-bas où les premiers rayons du soleil rougeoient l'horizon. La moisson!...C'est la sombre mort qui va moissonner les humains. A l'horizon le disque solaire d'un rouge sombre émerge d'un océan de nuages. Il a une forme ovale qui m'étonne, le grand axe est parallèle à l'horizon." (13/08/1914).

Alie, li montriĝas bona portretisto: " un autre, hongreur de son métier, surenchérit encore. C'est lui qui entonne des chansons patriotiques. Le nez en bec d'aigle, les sourcils broussailleux, une épaisse moustache noire lui barrant le visage, les yeux proéminents; il a un air farouche de Gaulois." (12/08/1914)

Li ankaŭ malkovras - surprize -flankojn de sia personeco: " Nous partons ! Pour les Ardennes, c'est tout ce que je sais. Il est 15h et la chaleur est suffocante. Malgré cela, je suis content de partir. *J'éprouve toujours une volupté à poser le pied à un endroit où je ne suis encore jamais allé. Pourquoi cela ? Le goût de l'aventure, de l'imprévu, me charme toujours. Les instincts ataviques se réveillent. Le sang des Normands pillards et aventureux circule encore dans mes veines. LE DANGER A UNE SORTE D'ATTIRANCE FASCINATRICE.*" (16/08/14)

Oni povus vidi tiujn tagnotojn kiel la genezon de pensmaniero. La onta Lanti, kiu estas nur tiuepoke Eugène Adam, 35 jaraĝa, anarko-sindikato, sciante nenion pri esperanto, sed jam socialisto, konvikita pri la absurdo de la patriotismo precipe kiam ĝi estas kovrita per religiaj dogmoj, daŭre allasas sin al gurditaj temoj: " Ma pensée se refuse à croire à cette horrible réalité. Ô folie humaine ! " 14/08/1914). – « Il y a de quoi devenir anarchiste ! » « Imbécillité, inconscience, folie, crime, sauvagerie: voilà ce qui résume l'époque actuelle. » 21/08/14).

La anonco - falsa - de Liebnecht kaj Rosa Luxembourg mortpafitaj pro siaj ideoj ekflamigas la idealiston : " fusillés pour avoir protesté contre la guerre. *VOILÀ UNE BELLE ET DIGNE MORT !* Le socialisme international éveille la conscience des hommes jusqu'à les faire mourir pour cette idée...Le catholicisme a fait faillite et les socialistes internationaux sont les successeurs de Jésus le Galiléen". (16/08/14). -

Male al la kutima priskribo de Lanti kiel ia furiozulo, li aperas paĝon post paĝo, kiel simpatia kunulo, komprenema kaj kompatema, sed malcedema pri siaj ideoj.

Ankaŭ aperas plurfaceta homo: filozofo, foje strategiisto kaj - pli neatendite- fascinita per la grandaj imperioj. Sed lia vilaĝa kaj normanda deveno proksimas plu : kiam li akceptas la gradon de kaporalo la tuta ĉambraro festas la eventon kaj ŝajnas, ke eĉ Lanti gustumis iomete da normandaj likvaĵoj kaj fine ĉiuj kantis dialektajn kanzonojn. Kaj la brankardisto ĝoje emfazas la agrablan vesperon...

Mi alvenis al Dinan fine de la mateno kaj renkontis kelkajn konatulojn kaj ankaŭ konatiĝis kun la paro Le Puil, la tradukintoj de " Vojaĝo ĝis noktofino", la ĉefverko de Céline. Kiel ne trafi la okazon por diri kia estis mia admiro pri la prodaĵoj en tiu traduko. Lanti, iĝinte esperantisto, sentis aspiron al la ĉefverko, kiu reliefigos la altvaloron de la Internacia Lingvo. Miaopinie, per tiu traduko, la paro Le Puil estas samnivele kun " Hameleto" de Zamenhof kaj " Kredu min, sinjorino" de Rossetti.

Dum la manĝo mi estis fronte al la karikaturisto de " La Sago", impona per la staturo kaj neelĉerpebla blaganto, estas viva pruvo de lingvo viva kaj amuza. Mi uzas la okazon por emfazi, ke je la okuloj de Lanti, la plej grava afero estis lerni kaj lernadi nian lingvon. " Lernu E-on kaj vi akiros sennaciecan animon". Antaŭ nelonge mi vidis filmeton, en kiu geinfanoj denaskaj esperantparolantoj, uzis la lingvon per la plej natura maniero. Se gepatroj havas tiajn geinfanojn, ke ili ne hezitu venigi ilin en niaj renkontoj. Ili estos la plej bonaj profesoroj.

Venis la tempo por podiumi. Vinko, helpe de surekranaj bildoj, prezentis al la partoprenantoj la grandajn etapojn de la vivo de Lanti. Poste, li invitis min al plia konatiĝo kun la fondinto de la sennaciismo. Tion mi faris pli elkore ol el notoj redaktitaj antaŭe, kiujn mi ne havis ĉemane. Mi ĉiam preferas spontanecon ol bone aranĝitan programon. Mi precipe timis pri la uzmaniero de

la lingvo, ĉar mi publike prelegis en esperanto por la unua fojo. La spirito de Lanti sendube helpis kaj la aŭskultantoj bone reagis. Cetere, trovi apogon ĉe Vinko, grande helpis la ŝnurdanciston. Ankaŭ la eblo por ĉiu el ni interveni dum la parolado de la alia, ebligis, ke ni povu precizigi niajn vidpunktojn kaj alporti novan prilumigon koncerne la pensmanieron de Lanti.

Post nia interveno, la publiko povis meti demandojn. La plej grava el ili temis pri la sinteno de Lanti al la virinoj. Mi respondis, ke mi, monaĥo, ne estas la plej taŭga homo por trakti tiun tiklan aferon, sed povas nur konstati, post la legado de preskaŭ ĉiuj verkoj de la Sennaciisto, ke li multon postulis de la virinoj. Ĉu lia mema konduto estis je la nivelo de liaj postuloj ? Ŝajnas, ke ne. Unu el la partoprenantoj konkludis la aferon: la konduto de Lanti ne estis fia, sed tamen aĉa, aldonante " neniu estas perfekta" !

Post la prelego, mi vizitis la libroservon kaj aĉetis kelkajn librojn. Estis jam la tempo retrovi mian ŝoforon por veturi al la monaĥejo. Mi havis en la kapo amason da agrablaj travivaĵoj, kiuj plifortigas mian esperantistan animon.

P-S. - Kiel ne substreki la "benediktan" laboron de Claudine Guegen, la kunulino de Vinko, kiu deĉifris la notlibrojn de Lanti, krajone skribitajn, kaj post unu jarcento jam velkemajn.



Pastro Mark (Marcel Lemeltier)

Vi abonas la Normandan Bultenon. Tre bone. Sed ĉu vi ankaŭ estas aliĝanto de naciaj aŭ internaciaj asocioj ?

Esperanto France : <http://esperanto-france>, 4 bis de la Cerisaie, 75 004 Paris. 09 51 77 18 33

Universala Esperanto Asocio (UEA), www.uea.org. En 2015, la Universala Kongreso okazos en LILLE de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto. Unika kaj ĉeestinda evento kun pli ol 2000 partoprenantoj !!!!

SAT-Amikaro : 132-134 bd Vincent Auriol 75013 Paris.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Kongreso en Nitro(Slovakio) de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto

APLIKITA PSIKOLOGIO

Kiam antaŭ pli ol ses jardekoj, mi prilaboris la provon de filozofio de mia baldaŭa ekzameno por abituriento, iu nocio de la kurso de psikologio kiun mi sekvis min aparte frapis. Mi neniam ĝin forgesis kaj ĝin ofte utiligis en mia posta kuranta vivo. Temas pri la nocio tiam france nomitan « Attitudes motrices », kiun mi tradukas en esperanto per « Kreivaj sintenoj ».

Jen pri kio temas, en tri konstatoj de faktoj, kaj unu konkludo.

1°) La sentimentoj kiujn ni spertas estas internaj fenomenoj de la konscio de nia persono, kiuj plejofte kuniras kun eksteraj, materiaj, videblaj fenomenoj. Oni tiel plejofte povas scii ke persono spertas ĝojon, malgajon, koleron, timon, senpaciencon, ... laŭ kelkaj bone konataj fizikaj manifestiĝoj kiuj ĝenerale akompanas tiujn aliulajn internajn fenomenojn, sen iĝi nekoneblajn de la ekstera mondo.

2°) Persono kiu konscias pri siaj internaj sentimentoj kaj volas iĝi kaŝi al la ekstera mondo, provas havi nelegeblan vizaĝon, bridi revelivajn movojn kiel tremado, malvidebligi ruĝecon aŭ palecon. Tiu sinteno estas tre aplikita de ekzemple profesiaj militistoj, kiuj dum danĝeraj situacioj timas kiel ĉiuj, sed sukcesas malpligrandigi sian timon klopodante prenigi al sia korpo, sintenon de ŝajna kvieteco. Same, eblas kaŝi kaj malpligravigi sian ĝojon, ĉagrenon, koleron, miron, ...

3°) Oni rimarkis ke inverso de la du antaŭaj konstatoj, ofte ankaŭ eblas : plenvole kreante

falsajn eksterajn signojn de sentimentoj, oni iagrade povas aperigi en si tiujn sentimentojn. Tio estas bone konata de la teatraj aŭ kinematografaj aktoroj, kiuj estas des pli bonaj ju pli ili vere sentas la sentimentojn de la personoj kiujn ili rolas.

Praktika humura konkludo de mia profesoro de filozofio : Se vi volas atingi celon kiu postulas malagrablajn kaj malfacilajn klopodojn, necesas materie agi kiel se la afero estus agrabla kaj facila. Ekzemple, se vi ne ŝatas lerni filozofion, aŭ matematikojn, la metodo valoras por ĉio, vi devas krei ĉirkaŭ si la « kreivajn sintenojn » de ŝato kaj intereso. Vi do enfermiĝu en via laborejo, senbalastigu la labortablon de ĉiu neutila aĵo, vi sur ĝin metu vian libron kaj kajeron de la malamata disciplino, silentigu la radion (hodiaŭ televidon kaj aliajn elektronikajn diablojn).

Tamen vi konservu la kvietigan certecon ke ĉio tio estas nur ŝajna enscenigo, ke tute ekstertemas eklabori matematikon aŭ kion ajn alian ; kvietigu vian mallaboremonton aŭ vian abomenon al la disciplino, kiu nenion riskas ĉar vi tute ne intencas tion prilabori. Sed daŭrigu la ludon : vi devas sidiĝi ĉe la labortablo, aperti la libron, asertante : "Ne timu malinklinon ! Ci nenion riskas, estas nur porrida ŝajnigo". Sed en la silento, en la favora medio, vi perfide komencu iom legi ... kaj krak ! Via malinklino estas kaptita, sufiĉas daŭrigi, vi estas laboranta, eĉ pri trigonometrio aŭ organika kemio.

Henri ROUSSEAU

: - : - : - : - :

ApliKATA PSIKOLOGIO. De longtempe, en katon reenkarigi volas edzo. Ja ne en senvaloran stratvirkaton ; li revas plej allogan destinon : postmorte iĝi la kato flategata de sia edzino. Kial ? Ĉar tiu ĉi feliĉa besto havas l'eksterkutiman ŝancon plaĉi al tiu virino, kies flamo, de tro da tempo, ne ardadas plu por li mem. Kiel la nuna kata konkuranto, li esperas, reenkarigi en katenon, eterne profiti la dolĉajn karesojn de sia mastr-amantino.

Iun nokton, la amomanka edzo tranĉas la kolon de sia rivalo. Tamen, plenuminte sian krimon, mortas la viro mem pro apopleksia krizo (sendube... pro troa feliĉo finfine sin liberigi el tiu kataĉo... !).

Malgraŭ sia granda doloro komprenebla, tre baldaŭ reedziĝas la vidvino. Nu la novedzo iun vesperon ekkrias :

« Amo mia, eniri hejmen ege volas kato, ĉu ci konsentas ? ». « Ja ne ! respondas la malpacienca virino. Ĉu malsaĝa ci estas ? Tia tro karesavida kato ? Ne ! Anstantaŭe, mian jupon rapide malbutonumu ! » aldonas ŝi per amordezirega voĉo.

De nun, la bonorela virkato nur pripensas memmortigon proksiman.

Gérard LECARPENTIER

KONTRIBUO AL SCIENCO

Mi estis soldato dum la milito en Alĝerio, kaj volis, kvindek jarojn poste, denove viziti tiun landon. Mi atingis sudan parton de Saharo kun dudeksep kunvojaĝantoj. Ni marŝadis sur longegaj dunoj, sub arda suno, kaj akvo estis rapide englutita. Saharo estas mirinda spektaklo kiun ni ankaŭ nokte admiris ĉar ni tranoktis sub la steloj.

Unu vesperon, mi elektis grandan rokon por min protekti, demetis miajn aŭdigilojn kaj ilin ŝovis en miajn ŝuojn kiuj kuŝis sur la roko. Kaj baldaŭ endormiĝis sub neforgesebla stelaro.

Frumatene, mi tuj vestiĝis, memkompreneble sen ĝuo de duŝo kaj ŝaŭma sapo. Por kompensi, mi antaŭvidis marŝadi kiel eble plej proksime de la virinoj kiuj surmetis parfumitajn tukojn por serene ĝui ties belan odoron. Mi tuj prenis miajn ŝuojn kaj nudpiede aliris la grupon. Sed mi rimarkis, ke la aŭdigiloj ne plu estis en la ŝuoj. Mi revenis al la roko kaj helpe de la kolegoj mi serĉis en la sablo. Vane.

« Jen perdo kiu multe pli altigas la prezon de la vojaĝo ! Stulta estas vi ! » mi pensis « kiel vi ne priatentis ilin ?! ». Sed kiam « vino estas tirita »... mi vojaĝis plu sen miaj aparatoj kaj kiel eble plej forte streĉis la orelojn por iom aŭdi la konversaciojn.

Tamen, dum kvazaŭ sensona marŝado, mi imagis, ke post dumil jaroj, arkeologoj traserĉos la sablojn kaj trovos miajn aŭdigilojn. Ili sin demandos « Kio estas tio ? Kiel la praaj homoj uzis ilin ? » kaj dank'al mi havos ion plian por enketi pri nia civilizacio...

Christian LEVESQUE

ARANĜOJ EN GRESILLON



La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo de Grésillon (Baugé, 49) proponas tre interesajn aranĝojn.

De la 17a ĝis la 25a de aprilo : Intensivaj kursoj kun Zsafia Korody, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut

De la 25a ĝis la 26a de aprilo : Internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1). Testu vian nivelon kaj akiru diplomon laŭ la eŭropa kadro por ĉiuj lingvoj.

Du 6 au 14 juillet 2015 : Vacances - Familles - Échanges réciproques de savoirs et de savoir-faire, pour familles avec enfants. Activités variées pour tous les âges, avec cours d'espéranto

De la 17a ĝis la 25a de oktobro : Lingva seminario kun Christian Rivière

kontakto : kastelo@gresillon.org gresillon.org/fr – 02 41 89 10 34